



ESPERO

INTERNACIA REVUO DE LA KULTURA UNO-
 IĜO DE POPOLOJ — OFICIALA ORGANO DE LA
 KLERIGA LIGO „VJESTNIK ZNANIA”
 REDAKTORE — ELDONANTO V.V. BITNER.

ПОДПИСНАЯ ЦѢНА

НА ЕЖЕМѢСЯЧНЫЙ ЖУРНАЛЬ

„Espero“.

Въ годъ съ пересылкою. . . 4 р. — к.
 „ „ за границу . . . 10 фран.
 „ „ безъ пересылки. . . 3 р. 50 к.
 1/4 года съ пересылкой. . . 1 „ —

Допускается разсрочка: Подписчики „Вѣстн. Знанія“ получаютъ „Espero“ (на обыкновенной бумагѣ) бесплатно, (совмѣстная подписка см. обложку «В. Зн.») Редакция „Вѣстника Знанія“ Невск. пр. д. № 147.

LA ABONPAGO

DE ĈIUMONATA ĴURNALO

„Espero“.

Por la jaro kun transsendo . 4 r.
 „ „ „ en eksterlando . 10 fran
 „ „ „ sen transsendo . 3 r. 50
 1/4 da jaro kun transsendo . 1 „ —

La abonantoj de „Vjestnik Znania“ ricevas „Espero“ senpage (sur ordinara papero). La redakcio „Vjestnik Znania“: St.-Peterburgo, Nevskij pr., d. № 147.

Надо готовиться!

На этотъ разъ наша бесѣда будетъ и короче и, если такъ можно выразиться, менѣе официальнаго характера, такъ какъ въ ожиданіи писемъ въ отвѣтъ на поднятый нами въ предыдущей статьѣ вопросъ о Народной Академіи, мы не станемъ его касаться по существу. Необходимо выждать обмѣна мнѣній, къ чему мы горячо приглашаемъ читателей, обращая ихъ вниманіе на крайнюю важность цѣлесообразной организаціи задуманнаго нами грандіознаго строительства будущаго Народнаго Храма Знанія.

Молчаніе тѣхъ, кто можетъ что-нибудь сказать, равнодушіе и бездѣятельность другихъ, сознающихъ всю необходимость для народа такого рода просвѣтительнаго . всеобъемлющаго учрежденія, будутъ преступленіемъ противъ гражданской совѣсти каждого. Помните, что Россія только начинаетъ обновляться. Но народъ въ ней непривыкъ къ самостоятельной жизни,—онъ ко всему равнодушенъ, даже къ собственному несчастью и невѣжеству, его надо убѣдить въ цѣлесообразности вашей работы, надо логически доказать пользу предлагаемой

Oni devas sin prepari!

Por tiu ĉi fojo nia interparolado estos pli mallonga, kaj, se tiel estas eble diri, ĝi havos malpli oficialan karakteron, ĉar, atendante leterojn, respondantajn al movita de ni en antaŭiranta artikolo demando pri Popola Akademio, ni ne tuŝos ĝin en ĝia esenco. Estas necese atendi intersanĝon de opinioj, al kiuj ni varmege invitas la legantojn, turnante ilian atenton al ekstrema graveco de celkonforma organizacio de la intencita de ni grandioza konstruado de estonta Popola Templo de l'Scienco.

La silento de tiuj, kiuj povas ion diri, indiferenteco kaj pasiveco de aliaj, konsciantaj la tutan necesecon por la popolo de tiaspeca kleriga ĝenerala instituto, estos krimo kontraŭ regnana konscienco de ĉiu. Memoru, ke Rusujo nur komencos renoviĝi, sed la popolo en ĝi ne kutimis al memstara vivo—ĝi estas al ĉio indiferenta, eĉ al propra malfeliĉo kaj malklereco, ĝin oni devas konvinki en celkonfarmeco de nia laboro, oni devas logike pruvi la utilecon de proponata spirita nufraĵo... Sed por tio ĉi, certe, oni devos plej antaŭe zorgi, ki ĝi efektive estu por ĝi necesa, sed ne ŝajnu

духовной пищи... А для этого прежде всего, конечно, придется позаботиться, чтобы она действительно была ему нужна и не казалась только такою нам самим. Это, понятно, задача очень нелегкая, и нашей интеллигенции надо будет основательно взять себя в руки, выйти изъ того удручающего морального состоянія, которое губить всё наши начинанія.

„Гдѣ ужъ намъ!“—вотъ та обычная пѣсня, которую всюду слышишь, когда пытаешься подвинуть на какую-нибудь общественную работу интеллигента, въ общемъ всюю душою ей сочувствующаго.

Эта духовная прострация, это отсутствіе всякой инициативы, всякой поддержки въ преслѣдованіи намѣченной цѣли, наконецъ этотъ вѣчный преступный и позорный страхъ передъ „городовымъ“, опасеніе, какъ бы онъ не усмотрѣлъ въ нашей затѣѣ чего-либо „неблагонадежнаго“, хотя бы самъ Христосъ на нее насъ благословилъ,—все это вмѣстѣ взятое наводитъ на очень грустныя размышленія о судьбѣ народа, въ главѣ котораго стоитъ такая интеллигенція.

А другая ея часть,—та, которая такъ долго работала въ подпольѣ,—развѣ много въ ней найдется людей дѣла? Оглянитесь кругомъ на нашихъ „переводчиковъ“, организующихъ одно за другимъ предпріятія съ очень благими задачами. И что же мы видимъ?—Одну только въ большинствѣ случаевъ, такъ сказать, „болтологию“: вездѣ говорятъ, говорятъ, подчасъ даже съ пламеннымъ убѣжденіемъ, ставятъ одну за другой „задачи“, оперируютъ надъ цифрами въ сотни тысячъ и миллионы, а въ общемъ все сводится къ одной только болтовнѣ.

Но едва ли не самое худшее во всемъ нашемъ просвѣтительномъ движеніи—разбросанность, даже разрозненность.

Мы имѣемъ на ряду съ мелкими обществами и кружками самообразованія и такія крупныя учрежденія, какъ напр. Лига Образованія, Общество Народныхъ Университетовъ, частныя Народныя дома (напр. графини Паниной), вольныя школы и такія учрежденія, какъ напр. „Маякъ“, „Богатырь“ и пр., по большей части малоизвѣстныя даже въ тѣхъ городахъ, гдѣ они функционируютъ. Оставляя, однако, въ сторонѣ эти общества съ болѣе или менѣе замкнутою дѣятельностью и учрежденія, приближающіяся къ типу учебныхъ заведеній, нельзя не замѣтить, что всё эти Общества, за немногими исключеніями, работаютъ плохо, и, забывая общность цѣли, представители этихъ Обществъ подчасъ даже злорадствуютъ, когда эта

цѣль nur al ni mem. Tiu ĉi problemo, kempreneble, ne estas facila, kaj nia inteligentularo devos fundamente kaj multe labori, eliri el tiu premanta morala, stato, kiu pereigas ĉiujn niajn iniciatojn.

„Tio ĉi ne estas ebla por ni!! — jen estas tia ordinara kanto, kiun ĉie oni povas aŭdi, kiam oni provas movi al la societa laboro inteligentulon, ĝenerale per la tuta animo ĝin kunsentantan.“

Tiu ĉi spirita prostracio, tiu ĉi malesto de ia ajn iniciativo, de ia ajn disciplino en atingado de prenita celo, fine, tiu ĉi eterna krima kaj malhonora timego antaŭ „policisto“, timo ke li ne vidu en nia entrepreno ion „nekonfidindan“, eĉ se mem la Kristo benus nin por ĝi,—ĉio tio ĉi, kune prenita, alkondukas al tre malĝojaj meditoj pri la sorto de popolo kies ĉefo estas tia inteligentularo.

Kaj la alia ĝia parto,—tiu, kiu tiel longe laboradis nelegale,—ĉu multajn homojn de vera agado oni trovos en ĝi?

Rigardu niajn „progresemulojn“, kiuj organizas unu post alia entreprenojn kun tre bonaj celoj. Kion do ni vidas?—nur solan en plimulto de okazoj, tiel diri, „babilemecon“: ĉie oni parolas, parolas, ofte eĉ kun flama konvinko, proponas unu post alia „problemojn“, prilaboras ciferojn de centoj da miloj kaj de milionoj, sed entute riceviĝas sola nur babilado.

Sed, povas esti, la plej granda malbono en la tuta, nia kleriga movado estos ĝia malunueco, eĉ reciproka malmikeco.

Ni havas samtempe kun malgrandaj societoj kaj rondetoj de memklerigo ankaŭ tiajn grandajn institutojn, kiel, ekzemple, la Ligo de Klerigo, la Societo de Popolaj Universitatoj, privataj Popolaj Domoj (ekz. de grafinio Panina) liberaj lernejoj kaj tiaj institutoj, kiel ekzemple „Majak“ (Lumturo), „Bogatyry“ (Fortegulo) kaj cet., en plimulto de okazoj malmulte konataj eĉ en tiuj urboj, kie ili funkcias. Lasante, tamen, en flanko tiajn ĉi societojn kun pli-malpli malvasta agado kaj institutojn, proksimiĝantajn laŭ sia tipo al lernejoj, oni ne povas ne diri, ke ĉiuj ĉi societoj, krom nemultaj esceptoj, laboras malbone, kaj forgesante la komuneco de sia celo, reprezentantoj de tiuj ĉi societoj iafaje eĉ mokus, kiam tiu sama laboro ĉe „konkuranto“ iras malbone. Pri unuigo de agado oni opinias tute neebla eĉ revii. Kaj en ĉio tio ĉi ne lastan rolon ludas ne estiminda honorosento, mallarĝa partiece kaj foresto de vera patriotismo.

Ke nia popolo en signifa grado havas tiun ĉi defekton, ke en ĝi sub in-

работа у „конкурента“ идетъ скверно. Обь объединеніи дѣятельности считается совершенно немислимымъ даже и мечтать. И во всемъ этомъ не послѣднюю роль играетъ мелкое самолюбіе, узкая партійность и отсутствіе истиннаго патриотизма.

Нашъ народъ, конечно, въ значительной степени страдаетъ этимъ недостаткомъ; въ немъ, подь влияніемъ ударовъ „судьбы“, утратилась національная гордость, а тяжелая жизнь и отсутствіе элементарныхъ условий для развитія сознанія принадлежности къ государству, въ чемъ-либо могущему быть полезнымъ его гражданамъ и привлекающему ихъ симпатіи, уничтожили и послѣдніе слѣды этого сознательнаго патриотизма, многими, сказать кстати, смѣшиваемаго съ зоологическимъ чувствомъ привязанности къ родинѣ. Съ другой стороны, въ настоящее время въ нѣкоторой незначительной части общества, находящейся подь влияніемъ реакціонныхъ элементовъ страны, патриотизмъ выролдился въ уродливую форму ненависти къ инымъ национальностямъ и людамъ инакомыслящимъ: къ „либераламъ“, „кромольникамъ“,—отсюда и тѣ взрывы ненависти, которые выражаются въ погромахъ „жидовъ“, отсюда тѣ ужасныя изувѣрства толпы (будь она даже не случайно собрана, а имѣетъ прочную организацию), изувѣрства, приводившія къ сожженію „студентовъ“ и всѣхъ иныхъ „кромольниковъ“, къ избіенію и истребленію ни въ чемъ неповинныхъ людей въ самой жестокой формѣ. Все это достаточно психологически объяснимо: но какъ понять упомянутую выше рознь среди интеллигенціи, работающей надь одною и тою же благороднѣйшею задачею—просвѣщеніемъ народа? Чѣмъ отличается отмѣченное выше стремленіе ставить палки въ колеса или радоваться ошибкамъ „соперниковъ“ отъ активныхъ выступленій реакціонеровъ противъ друзей народа?—Конечно, по существу ничѣмъ; очевидно, что ни у однихъ, ни у другихъ нѣтъ истиннаго патриотизма, заставляющаго, ради высокой цѣли, забывать не только о мелкихъ самолюбийскахъ, но и о личныхъ выгодахъ.

Естественно, что при недостаткѣ у насъ людей инициативы, людей дѣла, энергичныхъ, способныхъ работниковъ, обладающихъ даромъ творчества въ вопросахъ организации, эта разрозненность, это преступное „соперничество“ должно отражаться на дѣлѣ, и вся работа обыкновенно, повторяемъ, сводится къ пустой, подчасъ даже красивой, но все-же только болтовнѣ.

fluo de batoj de la „sorto“ perdiĝis nacia fiereco, kaj malfacila vivo kaj foresto de elementaj kondiĉoj por disvolviĝo de konscio de aparteno al regno, kiu povas porti ian, utilon al siaj regnantoj kaj allogi iliajn simpatiojn, detruis eĉ lastajn signojn de tiu ĉi konscia patriotismo, kiun multaj personoj, ni diru ĝustloke, ne distingas de zoologia sento de alligeo, al hejmo;—ke en la nuna tempo en ia nesignifa parto de la societo, troviĝanta sub influo de reakciaj elementoj de la lando la patriotismo degeneris en kriplan formon de malamo al aliaj nacioj kaj al homoj aliepanantaj, al „liberaluloj“, „periduloj“,—tiu ĉi do estas kaŭzo de tiuj eksplodoj de malamo, kiuj sin esprimas en pogromoj de hebreoj, de tiuj teruraj fanatikaĵoj de popolamaso (eĉ se ĝi estas neokaze kolektita, sed havas fortikan organizacion), fanatikaĵoj, alkondukantaj al forbruligo de „studentoj“ kaj de ĉiaj aliaj „ribelantoj“, al batado kaj ekstermado de nenion kulpaj homoj en plej kruela formo,—

— Ĉio tio ĉi psikologie estas sufiĉe klarigebla; sed kiel kompreni tiun suprenomitan malamikecon inter la inteligentularo, laboranta por unu sama la plej nobla problemo klerigado de la popolo? Per kio distingiĝas tiu deziro enmeti bastonojn en radojn aŭ gajoj pro eraroj de „kontraŭuloj“ de aktivaj elpaŝoj de reakcianoj kontraŭ amikoj de la popolo?—Kompreneble, laŭ esenco, per nenio; estas klare, ke nek unuj, nek aliaj havas veran patriotismon, devigantan pro alta celo, forgesi ne sole pri bagatelaj honorosentetoj sed ankaŭ pri personaj profitoj.

Nature estas, ke ĉar al ni mankas homoj de iniciativo, homoj de agado, energiemiaj, kapablaj laborantoj, posedantaj kapablon de kreo en demandoj de organizacio, tiu ĉi disigiĝo, tiu ĉi krima „konkurado“ devas influi al la agado, kaj la tuta laboro ordinare, ni ripetas, alkondukiĝas al malplena, iafoje eĉ bela, sed tamen sola nur bablado.

Necese estas al ĉiuj organizacioj unuiĝi interligi sin per unueco de la celo kaj komenci laboradi kune.

Por tio ĉi estas necesa, kompreneble, perioda organo, havanta legantojn, serĉantajn scion kaj pretajn porti ĝin en la popolon. „Vjestnik Znania“, kiel oni scias, per obstina laborado efektive akiris grandegan aŭskultantaron kaj metis fundamenton por fortika organizacio de grandega reto de klerigaj societoj.

Estas mem kompreneble ke ni kun plezuro proponas paĝojn de nia ĵurnalo por celoj de la unuigado de tiu ĉi kleriga agado de jam ekzistantaj sub diversaj nomoj societoj. Ni neniom aten-

Необходимо всё́мъ организаціямъ объединиться, связать себя единствомъ цѣли и начать работать заодно. Для этого нуженъ, конечно, періодическій органъ, и мѣщущіе и читатели, ищущіе знанія и готовые нести его въ народъ. „Вѣстникъ Знанія“, какъ извѣстно, упорнымъ трудомъ дѣйствительно завоевалъ себѣ громадную аудиторію и положилъ основаніе прочной организаціи цѣлой сѣти просвѣтительныхъ обществъ. Само собою понятно, что мы съ удовольствіемъ предоставимъ страницы нашего журнала для цѣлей объединенія этой просвѣтительной дѣятельности уже существующихъ подъ разными наименованіями обществъ. Мы, ни въ чемъ не посягая на автономное существованіе этихъ организацій, протягиваемъ имъ руку, приглашая присоединиться для общей работы. Хотимъ вѣрить, что лучше, безкорыстно преданные народу люди услышатъ этотъ голосъ и подумаютъ надъ вопросомъ о вліяніи общихъ усилий, направленныхъ къ достиженію одной высокой цѣли, и если многіе все-таки останутся глухими къ нашему призыву, если они не сдѣлаютъ со своей стороны ни одного шага, то особенно огорчатся тоже не придется, такъ какъ наличность сомнительныхъ элементовъ всегда является источникомъ обмануемыхъ ожиданій.

Но присоединятся ли къ намъ другія организаціи или нѣтъ, мы будемъ свое дѣло вести, не рассчитывая на эту поддержку, такъ какъ у насъ есть то, чего другіе не имѣютъ. Въ самомъ дѣлѣ, кружки и общества союза „Вѣстникъ Знанія“ представляютъ ячейки, являющіяся основой громадной сѣти, которая должна покрыть всю Россію очагами просвѣщенія, объединенными не только общностью цѣли, но и единствомъ основного плана и солидарностью всѣхъ читателей „Вѣстника Знанія“.

Итакъ, мы должны прежде всего полагаться только на свои силы. Необходимо немедленно приступить къ организаціи отдѣльныхъ кружковъ, гдѣ только возможно найти законное число учредителей*), скорѣе легализовать еще нелегализованныя общества „Вѣстника Знанія“, заняться ревностно вербовкою новыхъ членовъ, привлеченіемъ симпатій мѣстныхъ органовъ печати безъ различія направленій, собирать свѣдѣнія о мѣстныхъ потребностяхъ и привлекать

cante kontraŭ aŭtonomia ekzistado de tiuj ĉi organizaĉioj, etendas al ili niajn manojn, invitante ilin aliĝi por komuna laborado. Ni volas kredi, ke la plej bonaj, neprofitame aldonitaj al la popolo homoj ekaŭdos tiun ĉi voĉon, kaj pripensos la demandojn pri kunfluo de komunaj penadoj al unu alta celo, kaj se multaj personoj malgraŭ tio restos surdaj al nia alvoko, se ili ne faros de sia flanko eĉ unu paŝon forte ĉagrenigi ni ne devos, ĉar ekzistado de dubindaj, elementoj ĉiam estas fonto de trompitaj esperoj.

Sed ĉu aliĝos al ni aliaj organizaĉioj aŭ ne, ni farados nian agadon, ne esperante tiun ĉi subtenon, ĉar ni havas tion, kion aliaj ne havas, nome: la rondetoj kaj societoj de la „Ligo Vjestnik Znania“ prezentas ĉelojn, kiuj estas fundamento de grandega reto, kiu devas kovri la tutan Rusujon per fajrujoj de klerigado, unuigitaj ne sole por komuneco de la celo, sed per unueco de fundamenta plano kaj per solidareco de ĉiuj legantoj de „Vjestnik Znania“.

Tiel, ni devas plej antaŭe fidi sole al niaj propraj fortoj. Necese estas senprokrste komenci la organizaĉion de apartaj rondetoj, kie nur estas eble trovi postulatan de la leĝo kvanton de fondantoj *) pli rapide legaligi ankoraŭ nelegaligitajn societoj de „Vjestnik Znania“, sin okupi fervore per varbado de novaj membroj al tiro de simpatiojn de lokaj presorganoj de ĉiuj direktoj, kolekti informojn pri lokaj bezonoj kaj aliri ĉiujn eminentajn agantojn por estonta kleriga laborado, postulanta senprokrastan komencon.

La devo de ĉetaj membroj de rondetoj kaj societoj estas ankaŭ aranĝo de tiuj rilatoj al aliaj klerigaj organizaĉioj, kiuj servos por suprenomita necesa kunfluigo de ĉiuj plej bonaj fortoj de la lando por plenumo de la granda problemo—fondo de Popola Akademio.

V. Bitner.


всѣхъ выдающихся дѣятелей для будущей просвѣтительной работы, не терпящей отлагательства.

На обязанности выдающихся членовъ кружковъ и обществъ должно лежать и установленіе тѣхъ отношеній къ другимъ просвѣтительнымъ организаціямъ, которые послужатъ къ упомянутому выше необходимому сліянію всѣхъ лучшихъ силъ страны для выполненія великой задачи—устройствія Народной Академіи.

V. Битнеръ.

*) О порядкѣ подачи прошеній относительно легализаціи обществъ и уставѣ С. Петербургскаго общества „Вѣстника Знанія“ см. № 5 «Вѣстника Знанія» за этотъ годъ.

*) Pri la ordo de prezento de petskriboj pri legaligo de societoj kaj la regularon de la Peterburga societo „Vjestnik Zn.“ rigardu № 5-aŭ de „Vjestnik Znania por la nuna jaro.



La promeso de l'angelo.

Rakonto de Ero Alpi.

(fama finna novelisto).

Varmega printempa suno lumas en mizeran loĝejon sur la rando de la urbo. Ĝiaj, petolemaj radioj saltadas de loko al loko. Ili leviĝas sur liton, penetras en malpuran matracon, sed tie nenion trovinte, krom sekan pajlon, ili leviĝas laŭ ŝirita kovrilo al kuŝeno kaj haltas tie ĉi minuton, por ekrigardi tri infanojn, senzorge dormantajn, kvankam la suno jam estas alte sur la ĉielo. Ĉe la muro kuŝas malgrasiĝinta knabo, proksimume dekjara kaj apud li dormas, ĉirkaŭpreninte unu la alian, du malgrandaj knabinoj, unu el kiuj eĉ ne travivis tri jarojn en tiu ĉi triviala mondo. La alia, pli maljuna, ĉirkaŭprenis per siaj maldikaj brakoj la kolon de la pli juna fratino; kaj dormas ili tie ĉi trankvile; kaj sonĝas, Dio scias, kiajn feliĉajn kaj fabelajn landojn. La radioj ludas ĉirkaŭ unu minuto sur iliaj palaj vangoj, poste transsaltas sur malnovajn seĝojn, de ili malleviĝas sur la plankon kaj ektrovas en angulo ian lignan keston, interne de kiu estas kelkajn bretoj. Sed tie ili nenion trovas krom du tasoj kun rompitaj preniletoj kaj iom da sekiĝinta fiŝo sur la telero,— kaj la radioj daŭrigas sian observadon. Sed ĉar en la ĉambro ne estas pli da objektoj por observo, ili, iom ludinte sur la tablo, sur kiu staras malplena kruĉo, revenas ree sur la fenestron, malsupreniras sur la korton kaj forflugas en pli bonajn lokojn. Mallumeto plenigas la ĉambro.

Palvizaĝa, mezaĝa virino estas okupata per io ĉe forno. Ŝia vizaĝo estas flava kaj lacigita. Ŝiaj mamoj pendas kaj ŝia spirado estas malfacila. La

plej maljuna infano de la familio, dektriaga knabino, balaas la plankon.

„Panjo“,—diras ŝi subite, lasante la laboron, „Ĉu ne estas tempo vekti la fraton kaj malgrandajn fratinojn, ĉar la tura horloĝo, kiam mi estis eliranta en la korton, montris jam naŭ?“

„Ankoraŭ dormu ili, Ajlio“, respondas la virino mallaŭte, tiel ili ne sentas almenaŭ la malsaton. Ni ne havas eĉ ĝuton da lakto, por doni al ili, kiam ili vekigis“. Kaj larMO glitas sekrete laŭ ŝia vango.

„Rigardu, panjo“,—daŭrigas la knabino,—kiel Luizo kaj Sajmo dormas ĉirkaŭpreninte unu la alian. Sajmo kvazaŭ defendas sian malgrandan fratinton kontraŭ iu, kiu volas fari ion malbonan al ŝi.“

„Kompatinda Luizo tre malsatiĝis hieraŭ vespere, sed ja ne estis...“—rakontas la patrino kaj ŝia voĉo denuncas la pretecon de larmoj spruciĝi el la okuloj, sed ŝi detenas ĝin.—Sajmo admonis ŝin poste, ke bona angelo nokte alportos, se ŝi vespere trankviliĝos kaj ne ploros, dolĉaĵojn kaj donos al ŝi kiom ŝi volos, tiel ke ŝi eĉ matene longe ne sentos malsaton. Tiel ŝi dormigis Luizon per siaj admonoj kaj ekdormis mem, kvankam ŝia stomako estis kredeble ankaŭ malplena.

Minuta silento. Ajlio daŭrigas balai la plankon. Sed baldaŭ ŝi lasas ree la balailon kaj demandas preskaŭ plorante:

— Ĉu trovos la patro hodiaŭ laboron?

— Mi ne scias, kara infano, sed ni atendu la plej bonan. Ĉerte li baldaŭ revenos de la mastro“.

„Ĉu vi scias, panjo“,—diras la knabino, kaj ŝiaj okuloj brilas tra larmoj,—

„mi opinias, ke baldaŭ venos pli bona tempo por tiuj ĉi infanoj, kiam ili estos ricevantaj sufiĉe da ĉia nutraĵo. Sciu, mi vidis la lastan nokton tre bonan sonĝon kaj mi tre esperas, ke ĝi antaŭmontras pli bonajn tagojn. Mi vidis belan anĝelon kun blankaj flugiloj, kiu havas inter la manoj oran brilantan kalikon, plenigitan per dolĉaj kuketoj. Kaj mi diris al li: Ĉarma Dia anĝelo, permesu al mi alporti al mia frato Arvio kaj al miaj fratinoj Luizo kaj Sajmo. Ili estas tre malsataj, kaj mia patro nenie trovis laboron, malgraŭ liaj penoj. Se vi ne kredas, demandu Dion. Li nepre diros al vi, ke mi diras veron. Sed demandu Lin ankaŭ, pro kio Li lasas nin suferi tian malriĉecon, dum multaj aliaj homoj estas riĉaj kaj feliĉaj kaj malgraŭ tio, ke la patro kaj ni estas tiel same honestaj homoj, kiel tiuj riĉaj. Jes, demandu pri tio kaj poste diru al mi la sekvontan nokton, kion Dio respondos je tio,—diris mi. Sed tiu ĉi bela anĝelo nur ridetadis kaj murmurete diris: morgaŭ povos viaj malgrandaj fratinoj kaj la frato mem preni al si kuketojn el tiu ĉi kaliko. Sed tiutempe mi vekigis, kvankam mi volis ankoraŭ aldiri, ke panjo kaj mi estas ankaŭ malsataj. Tiu ĉi sonĝo, ĉu ĝi ne estis mirinda, panjo?“

„Jes, ĝi estas tre mirinda... sed, do pro kio ne venas tiel longe la patro? Certe li trovis laboron kaj parte prenis estontan salajron. Eble li alportos al ni ion mangi kaj la ĝojo ekbrilis en, — ŝiaj malgrasaj okuloj.

Bruo de paŝoj eksonas en la vestiblo. Ambaŭ ektremas. Streĉita atendo esprimiĝas sur iliaj vizaĝoj. En la ĉambiron eniras viro. Lia vizaĝo estas pala, kiel tolo, liaj lipoj skuigiĝas, mal-lumega rigardo brilas en liaj okuloj.

„Ĉu ne... ĉu ankaŭ nun...?“ ekkrias la virino kaj laŭte esploras.

La edzo ne respondas, li ĵetas la ĉapon sur la tablon kaj sidigiĝas. Lia kapo malrapide malsupreniĝas sur la manojn.

Li estas altkreska, kun densa barbo. Li sin tenas iom ĝibe, sed tuta lia korpo spiras la sanon.

Mallaŭteco. Estas aŭdata nur la eksplo-rado de la virino kaj la spiro de dormantoj infanoj.

La kapo de la viro leviĝas. Li ekri-gardas la edzinon, kiu sidas ĝibe sur la seĝo kaj la filinon, senparole fleksi-ĝintan genuojn antaŭ la patrino. Poste li rigardas la liton. Liaj okuloj pleniĝas de larmoj, lia ekstero estas premita. Sekrete li for viŝas per maniko siajn larmojn. Sed subite lia brusto leviĝas, vejnetoj sur la vizaĝo plenigas de sango kaj el la lipoj elflugas terura malbenajo.

„Pasas minuto. Lia vizaĝo montras neklarigeblan esprimon. Li, ŝajnas, ion decidis. Kaj, ŝajnas, kvazaŭ moka rideto vagas sur lia vizaĝo. Li diras per mal-laŭta voĉo.

„Ni estas forpeltitaj de tie ĉi — ni transloĝiĝu.“

Estas aŭdata neĉesiĝebla plorado. La edzino demandas per malĝoja voĉo.

„Eble oni povas ankoraŭ peti la mas-tron pri afableco.“

— Jam provis mi. Ne helpas. Liekkriis nur: foriĝu sur la straton kun viaj infanoj! Mi iradis serĉi loĝejojn preskaŭ en dek lokojn, tial mi venis tiel mal-frue, sed ĉie oni diris, ke vi havas tiom multe da infanoj kaj krom tio vi ne pagis por la loĝejo al via antaŭa mastro...“

— „Malfeliĉaj infanoj!“ ekĝemis la patrino.

„Prenu markon *)“, diras la edzo, — „mi pruntis ĝin de kolego,—iru kaj aĉe-tu ian mangiĵon por la infanoj.“

La edzino prenas la moneron, ĵetas tukon sur sin kaj foriras. Kiam la pordo fermiĝas, Ajlio nerimarkeble aliras al patro, ĉirkaŭprenas lian kolon kaj mallaŭte parolas:

„Ne malĝoju, kara patro, mi vidis mirindan sonĝon, kiu certe promesas bonaĵon. Mi vidis..“

„Vi rakontos ĝin alifoje, mia kara. Sed nun petu de la najbaroj iom da acidaĵo, ĉar la patro volas trinki.“

Ajlio prenas kruĉeton kaj inten-cas foriri. Sed entaŭe ol ŝi atingas la pordon, la patro levas sin sur la ma-noj kaj forte premas al sia brusto; poste li lasas ŝin. Ajlio kun miro daŭre rigardas sian patron, ridetas kaj foriras.

La edzo restas sola. Li alkuras al la lito kaj varmege kisas la infanojn. Poste, kvazaŭ en febro, li premas per ambaŭ manoj siajn tempiojn. Liaj lipoj paliĝas, lia vizaĝo neordinare rad-ias. Unu momento nur—kaj li ekkap-tas el anĝulo hakilon.

* * *

Kvazaŭ bruego en arbaro tra la urbo disvastiĝis la sciigo pri la terura oka-zo kaj baldaŭ grandega amaso da po-polo estis ĉirkaŭanta la malgrandan laboristan loĝejon sur la rando de la urbo. Nun en la loĝejo estis kuracisto kaj policanoj. La malfeliĉa virino, jam sciigita en la urbo pri la okazintaĵo, ricevis konvulsian frapon, kaj estis for-portita en malsanulejon. Ajlio, krias sur la korto kvazaŭ buĉata. Ŝi krias per animŝiranta voĉo „Patro, Arvio, Luizo, Sajmo!“ Sed terura turmento iom post iom forprenas de ŝi la pru-denton, kaj inter la plorado ŝi subite sonigas teruran ridon.

*) Finlanda monero.

Oni perforte forportas ŝin, kvankam ŝi kontraŭbatalas kaj mordas. El ŝia buŝo verŝiĝas ŝaŭmo kaj ŝia langopendas mordita ĝis sango.

Tra la amaso iras murmureto: „oni jam portas“.

Estas malĝoja la paŝado. Antaŭe oni portas du fratinojn. Ĉirkaŭpreninte unu la alian, ili kuŝas; eĉ nun oni ne volis ilin disigi. Tiel oni volas ilin enterigi. La manoj de la pli maljuna fratino premas, kvazaŭ fera premilo, malgrasiĝintan korpon de Luizo. Ĉe ambaŭ la kapoj estas fortranĉitaj. La sango jam tute elfluis. Sed sur iliaj lipoj rigidigis agrava rideto. Ĉar ili jam ne estas malsataj.

La anĝelo plenumis sian promeson kaj nun la mizerulinoj sin sentas bone, nun ili neniun malhelpas, ĉar la varma brako rifuĝigis ilin por ĉiam.

Post ili oni portas knabon, sur kies kapo estas grandega malfermita vundo. Kaj fine, kiam iĝis videbla la korpo de ankoraŭ viva patro, de tiu, kiu mortigis siajn tri infanojn kaj poste mortige vundis sin mem, en amaso eksonas krioj de teruro. Sed la tutan amason da popolo ekscitas ia neordinara, mistera sento.

En ĝi estas sentata io sovaĝa, malŝkvieta, kulpiganta.

Korespondistoj de gazetoj rapidiĝas en redakciojn kaj skribas artikolojn pri la „senkora patro“, kvankam pli volonte ili dezirus skribi ion pri „troa koreco“.

Malĝoja paŝado pasas plu. Malforta vento komenciĝas kaj balancas arbajn branĉojn en ĝardeneto. Iom post iom ĝi aliformiĝas fortan ne ventoturnon. De la strato leviĝas kolonoj da polvo, kaj nigraj nuboj kunvenas sur la ĉielo.

Kaj kiam la paŝado preteriras la domon de tiu riĉulo, kiu la lastan fojon rifuzis la laboron al mortiginto, tiam eksonas surda murmuro en akompananta amaso kaj ĉiuj rimarkas, ke pala vizaĝo returniĝas de la fenestro.

La vento bruas. Kaj, ŝajnas, kvazaŭ ĝi kantas ion pri kondamno.

Kiam do oni alvenas al tiu konstruaĵo, kie loĝas riĉa domhavanto, forpelinta la mortiginto el la loĝejo, ĉiuj vidas, ke skuiganta viro forkuras tra la pordego en korton.

La ventoturno ĉiam plifortiĝas kaj plifortiĝas.

Nubj densiĝas sur la ĉielo, kaj sur la pekan teron verŝiĝas forta pluvado.

Tradukis E. Budzinski.



V. V. Vereŝagin, kiel pentristo kaj propagandisto de la paco.*).

Nek unu el pentristoj, ne nur rusaj, sed aŭkaŭ el la eŭropaj, havis tian vastan kaj laŭtan famecon, en diversaj vicoj de l'socio kaj de la nacioj de ĉiuj landoj, kiel la mortinta V. V. Vereŝagin. Por tio ĉi ekzistis multaj kaŭzoj, sed, certe, la plej ĉefa el ili estas la grandega intereseco de liaj temoj, ilia proksimeco al la anima stato de ĉiuj, la akreco de l'demando, ekokupanta ĉiun pensantan homon.

Oni devis havi tiun maloftan labor-kapablecon, kiun posedis la mortinta pentristo, tiun vere Vereŝagin'an sen-

lacan spiriton, por dum sia tuta vivo persiste kaj avide rapidi post la impresoj, de l'estado, sin ĵetante el vojaĝoj al militoj, kaj de l'militoj en vojaĝojn, por tiel longe kaj obstine labori por unu celo, militante kontraŭ la milito, kaj perĉi per la mano de tiu sama minaca dio, por la batalo kontraŭ kiu li elspezistiom da'energio, forto kaj talento.

La verkoj de Vereŝagin en centmiloj da ekzempleroj disvastiĝis tra la tuta mondo kaj kreis tutan literaturon. Sed vide kun tia granda populareco, kiun tre malofte favoras eĉ la plej eminentajn talentojn, la loko, kiun Vereŝagin okupos kaj okupis en la historio de l'pentarto, tamen ŝajnas esti

*) Tiu ĉi artikolo ruse esras presita en „Vest. Za.“, por 1905 j., en 1 №.


iom tro modesta. sufiĉe pli modesta ol starigi ĉefe de la rusa pentrarto, aŭ eĉ tiu, kiun li plenrajte povus okupi interde unu el ĝiaj skoloj. Li ne kreis apud la agemaj propagandistoj de l'ideo de si imitantojn, kiel tio ĉiam estas ĉir-
t. t. monda paco kaj fervoraj kontraŭ-kaŭ grandaj talentoj, li ne restigis



Portreto de V. V. Vereŝagin. — Liaj pentraĵoj: „Sur la monto Ŝirka ĉio estas trankvila“ — „Antaŭ fortikaĵo“ — „Forgesita“.

uloj de l'milito, ĝuste de l'vidpunkto post si aron da posteuloj, kiuj daŭri-
de tiu ĉi propaga da signifo oni devas gus popularigi, ripetadi kaj ellaboradi
ĉefparte observadi la verkojn de Vere- liajn metodojn. — kiel estas kutimo diri,
ŝĉagin. Sed kiel pentristo, li ne estas li „ne kreis skolon“, ne inspiris per
tia emmenta grandaĵo, kiun oni povus siaj verkoj la novan generacion de pent-

ristoj. Io estis en liaj pentraĵoj, kio nehelan, fortan naturon, en liaj frukto-ple-sibmetadis, ne altiradis, ne limigalis nan ageman vivon, ni nevote admiras kaj ne kortuŝadis la junajn fortojn. Ne kiel liajn verkojn, mirigantajn per ilia



V. V. Vereŝagin: „Rebato de atako“—„Kun bataliloj en manoj,—pafmotiguilin!“ (El la milito de 1812 jaro. „Ĉirkaŭitaj“).

haltante dume ĉe esplorado de tio ĉi produktomeco, tiel ankaŭ mem la belan „io“, kio koncernas nur la puran arton, kuraĝan personon de tiu ĉi neordinare kaj trankvile enrigardante en tiun ĉi talentplena homo.

Eĉ en la mollingigita historio de lia vivo, antaŭ ni pentriĝas homo, eterne bolanta per spirita fajro, nesatiĝanta naturo, kiu neniam haltas sur sama loko, kiu neniam kontentiĝas je tio, kio jam estas farita, kiu eterne kaj avide celas ien antaŭen. Naskiĝinte en 1842-a jaro, Vereŝagin en la jaro 1853-a envenis en la maran kadetan korpuson. Fininte tie la kurson kaj servinte en la moristaro nur unu monaton, li ekŝiĝas kaj envenas en la Akademion de l'Artoj, ricevas tie malgrandan medalon pro la skizo „Elmortigo de l'fiandĉoj de Penelopo“. forlasas la Akademiojn kaj ekveturas eksterlanden, en Parizon, kie laboras sub gvidado de la konata franca pentristo Jéron kaj de aliaj. En la jaro 1867 ni vidas lin jam en Turkeŝtano apud general-guberniestro Kaifman, kie apud Samarkando li ricevas Georgian krucon *). En 1877-a jaro li ĉeestas sur Dunajo, sin trovas ĉe Skobelev kaj Gurko, ricevas vundon sur la minŝpo de leŭtenanto Skridlov, poste partoprenas apud Plevna kaj dum la kovaleria atako kontraŭ Adrianopolo plenumas la oficon de stabestro. Traveturadinte la tutan Eŭropon, Hindujon, Palestinon, Sirion, estadinte sur Filipinaj Insuloj dum la hispana—amerika milito, li nelonge antaŭ sia morto, traradis la tutan Japanujon, daŭrante samtempe senhalte laboradi, pentradibildojn, elmontrante ilin jen ĉe ni, jen eksterlande. En la jaro 1874-a pro la pentraĵoj elmontritaj en Peterburgo, la Akademio de l'Artoj, aljuĝas al li la rangon de profesoro, kiun li tamen malakceptas, kaj preskaŭ je la fino de sia vivo, poste la unua eksoninta Oriento, de l'pafilogoj en la Malproksima Oriento, la 62—jara maljunulo rapidas tien kun flameco de 20—jara junulo. Trasorbigitaj per varmega protesto kontraŭ la milito, dediĉinta sian tutan vivon al la batalo kontraŭ ĝi, li samtempe ne povis elteni, kaj ĉe la unua fajrero de l'ekflamiĝinta milito, ekveturis tien, por poste kun ankoraŭ pli granda heleco montri ĝiajn negativajn ecojn. Oni nevolle ekpensas ke se tiu ĉi vivema, ĉenergiema, movema homo estus ne pentristo, sed, ekzemple, ia ajn elektita socia aganto, organizanto de socia stato, aŭ gvidanto de partio kreanta de novaj politikaj movadoj,—li en la Okcidento, kaj en la nuna tempo ankaŭ ĉe ni, ankoraŭ pli multe disvolviĝus, ankoraŭ pli larĝe kaj hele aperigus sin, ol en la, efektive, profunda kaj forkaptanta, sed en certaj rilatoj limigita sfero de agado, kia estas la pentrarto. Lia granda naturo kvazaŭ kun malfacileco enmetis sin en la kadron de l'pentrarto, por li estis mal-

facile sin deteni kaj ne transiri, eble nevole, tiun limon de noblaj linioj, per kiuj estas karakterizita la pentrado kiel arto, kaj ekster kiuj komencas jam tia aŭ alia socia propagando kun publicista karaktero. Forte konvinkita realisto en la arto, li iutempe estis devigata enveni en ekstremon de naturalismo, oferi la pure artajn valorojn de siaj laboroj je nomo de la difinita tendenco, sur ĝian altaron alporti la artan parton de l' verko. La pentristo vivis kvazaŭ ĉiam timante, ke la nekapteble molaj artaj formoj nebuligos por la popolamoso la klarecon de l'intenco, ke la ideo estos ne sufiĉe rapide kaj facile komprenita, klarigita kaj imagita. Kaj jen, haltante antaŭ neniaj artaj malproftoj en siaj pentraĵoj, li akre, iutempe ĝis krudeco, substrekis per krianta realismo la regantan ideon, oftege transirantan en imageblan kaj eĉ en iutempe sin nemaskantan tendencecon. La deziro, kion ajn tio kostus, influi sur la publikon, kiel eble plej forte, alkondukis lin ĝis tiaj, malproksime de l'superaj problemoj de l'arto starantaj agoj, kiel ekzemple la decido aranĝi en Berlino ekspozicion de siaj, bildoj de la rusa—turka milito kun orkestro de muziko, kiun li enlokiĝis malantaŭ la pentraĵoj kaj kiu mal-laŭte ludis finebran marŝon. Inter la bildoj de tiu ekspozicio, sin trovis ankaŭ la konata pentraĵo „Apoteozo de l'milito“ (piramido el homaj kranioj) kaj la „Meso pro mortintoj“. (sur kam-lapo, plena per nudaj kadavroj de l'mortigitaj, la pastro kun fumanta bonodor-fumilo faras la lastan diservon) Nature, tio faris sur la publikon premantan impreson, kaj per tio ĉi atingiĝis la ĉefa celo de liaj verkoj.

En la pentraĵoj de Vereŝagin ĉio direktiĝis al la sola celo: hipnotizi la popolamason, enradikigi en la rigardanton nur unu ideon, ekbruligi en lia amo la indignantan senton de l'protesto, ekflamiĝi lin per malamo kontraŭ la malbono, la demandoj do de la pure arta tekniko kaj de valoreco de l'pentraĵo foriĝis en postan lokon. La publicisto venkas. La artisto formortis kaj enombriĝis. Guste la venko de l'ideeco super la artaj valoroj en pentraĵoj de Vereŝagin konservis lian nomon en memoro de l' homaro,—sen tio li devis perdiĝi en la amaso de malpli famaj pentristoj. Ĉefparte, lia merito kuŝas en tio, ke li estis la unua, kiu per kuraĝa mano forŝiris la poezion tolaĵon, per kiel nebulo estis ĉirkaŭitaj la abomenaj ulceroj de l'milito; li la unua devigis ĉiun konvinkiĝi je la fantomeco de ĝia heroa aŭreolo.

En pli fruaj tempoj la poetoj kaj pentristoj prikantis la militon, kvazaŭ ion nekredible belan, kiel majestatan poe-

*) Rusa ordeno donata pro kuraĝeco.

mon de homa forto kaj sentimeco: la venkportante ventumiĝantaj miltkoloraj standadoj, la inspiremo kuraĝaj vizaĝoj de militistoj, galopantaj sur rapidaj belaj, ĉevaloj, kombinitaj de la pentristo en pentrindajn grupojn. Tiaj bildoj tute forkovris de nia atento la realecon, mallumigis nian memoron, igis forgesi ke post ĉio ĉi sin kaŝas kruelegeco, ke post la belaj ornamajoj regas kaj furiozas abomeninda morto, sonas animŝirantaj ĝemegoj, kvazaŭ rivero fluas varma sango, kripliĝas vivaj estaĵoj, senplende mortas en nenio kulpaj junaj vivoj, fluetas larmoj... Per profunda ironio sonas la pentraĵoj de Vereŝagin pri tiuj ĉi temoj. „La malamiko ne montras sin. Bataloj forestas, sur Ŝipka ĉio estas trankvila“, diras la raporto de l'militteatro kaj trankvile frostiĝas dekmiloj da homoj en la neĝaj amasoj de la Balkanoj. Jen en malproksimeco sur la posta loko del pentrato, antaŭ la fronto de la vice ordigitaj militistaroj, rapidas kun malkovrita kapo la „blanka generalo“ *); mилоj da ĉapoj ekflugas supren kaj sonegas la venka krio: „ura!“ Kaj sur la antaŭa plano de l' bildo estas kunigita amaso da glaciĝintaj, en malbelaj situacioj, kadavroj, elstarantaj el la neĝo kaj aperantaj kiel akra kontrasto al la unua parto de l' pentraĵo. Tiaj estas ankaŭ la aliaj pentraĵoj de Vereŝakin el la rusa—turka milito, el kiuj apartiĝas: „Ili eniru“. „Antaŭ la atako“, „Post la atako“, „Ili enpenetris“, kaj el la turkestana milito, ekz. „La venksignoj“ kaj multaj aliaj.

Sub influo de la riproĉoj de kritikistoj, pentristoj kaj de la publiko je la tro maldelikata tenceco kaj je ofendo de la patriotaj sentoj, Vereŝagin eĉ nenigis kelkajn bildojn: „Oni ĉirkaŭis“, „Ili eniris“, „La forgesito“. De tiuj ĉi pentraĵoj, cetero, restis fotografaĵoj, sin trovantaj kune kun ĉiuj bildoj en la galerio de fratoj Tretjakov en Moskvo. La unu prezentas „forgesitan“, neforigitan kadavron; super ĝi aro da flugpendantaj korvoj. Du ceteraj bildoj faras efektive premantan, skuegantan impreson: en ili estas prezentitaj tiuj teruraj apartaj momentoj, kiam la milito ĉesas esti milito, perdas ĉion kaj aliĝas simple en sovaĝan bestan mortigadon.

Kaj nun ni, foririntaj antaŭen je pli ol kvarono da centjaro, transvivinte ankoraŭ pli teruran militon, povas konvinkiĝi nur ke la figurataj de Vereŝagin militbildoj estas nur malforta ilustraĵo de l' realeco, kaj tiaj pentraĵoj kiel „Post la atako“ (militira malsanulejo, apud kiu multo da vunditoj kun bandaĝoj sidas grupe kaj staras en diversaj situacioj)

prezentas nur la tre kutiman kaj ordinaran bildon ĉe la masa ekstermo en la nuntempa milito. Kaj ne riproĉojn meritas Vereŝagin pro tio, ke li montris al ni la militon en ĝia tuta malbeleco, ĉar per tio li ankoraŭ pli forte elvokis en ni abomenon al ĉi tiu tutmonda malfeliĉo, kiu kvazaŭ peza malbeno pendas super ni. Ju pli ni malamos la militon, des pli proksime ni estos al la luma idealo de frateco kaj amo, al kiu la homaro celas tiom da centjaroj, ne sciante eĉ alproksimiĝi al ĝi. Tute merite oni nomis Vereŝagin on unu el la plej eminentaj kandidatoj por la Nobel'a premio, kiu estas donata al la plej grandaj agantoj pro la utilo de la ideo de tutmonda paco, kaj eble alie en io alia, sed en tiu ĉi rilato la nomo de Vereŝagin povas esti metita vice kun la nomo de la granda verkisto de la lando rusa, de L. N. Tolstoj.

Ĝis nun ni parolis pri la signifo kaj meritoj de Vereŝagin, kiel de propagandisto de la paco. Sed Vereŝagin meritas atenton ankaŭ kiel artisto. Kvantkam ankaŭ la pli granda parto de liaj pentraĵoj estas dediĉita al la celoj de kulpigo de la milito, li tamen havas multajn verkojn, koncernantajn nur la region de pura arto, t. e. tiajn verkojn, kiuj ne rajtigas sian ekzistadon nur per la enkorpigita en ili ideo, sed havas, krom tio, ankaŭ sian pure artan valoron.

La arta klareco de la ideo havas nenion komunan kun la tiel nomata, videbleco. Kiel en literaturaj verkoj la precizeco de la parolo ofte estas la vera kaj ĉefa malamiko de la arta larĝeco de l' ideo, tiel ankaŭ en la pentrato la superflua realigo de la priagata temo mortigas la spiritecon de l' bilda prezentado de ideoj.

Parolante pri la pentraĵoj de Vereŝagin, estas necese rimarki, ke en ili tiu ĉi du valoroj, la ideo kaj la arta, ne povas vivi kune. Tio ĉi devenas, kompreneble, de tio, ke Vereŝagin tamen do estas ne sufiĉe artsentema, ne sufiĉe delikata artisto, kaj ankaŭ de tiuj malveraj konvinkoj, kiujn havas ĉiuj pentristoj-realistoj, pesantaj la valorecon kaj indecon de la bildo sur la pesilo de utileco kaj ignorantaj ĉiujn aliajn valorojn de la pure arta karaktero, kiel senkulpan amuzadon de estetika bagatelado. La eraro tie ĉi estas en tio, ke ili ĉiuj celas pli kompreneble kaj reliefe esprimi la ideon, alarangiinte ĝin al la ĉirkaŭaĵo de l' vera realeco; ili penas aldoni kiel eble pli multe da vero, ornami kiel eble pli multe per realecaj detalaĵoj, kvazaŭ timante almeti de si mem eĉ unu strekon aŭ pentretron, forgesante ke prezenti la realecon estas tute neeble, kaj tute ne ekzistas

*) Tiel oni nomis la generalon Skobelev.

tiaj manieroj, per kiaj oni povus atingi tion. La arto nur sin apogas sur la realecon, sed la prezentado de tiu ĉi lasta neniam estis kaj ne povas esti la celo de l'arto. La realeco nur estas ĝia komenckpunkto. Ĝi, rilate al arto, servas kvazaŭ nutraĵo sen kiu la lasta ne povas ekzisti kaj kiu; estante enigata kaj digestata per la aparato de l'arto, aperas ĉe la pentristo jam en aliigitaj formoj de arta kreado. Ju pli larĝe ĉirkaŭprenas la ideo la tutan verkon, trasorbicante ĝin trae per sia spirito, des pli plena estas la arta iluzio. Ĝuste de tie ĉi venas la diferenco inter la bildo kreita per arto kaj la fotografe preciza prezento de ia ekstera fakto, kvankam ankaŭ la fakto mem, kompreneble, povas doni instigon al naskigo de la ideo, sed sole al la naskigo: neniam li donos ideon en ĝia pleneco.

Kiel klarigon mi permesas al si montri ekzemple la pentraĵon de Franco Stuk, priagantan parencon kun Vereŝĉagin temon, sub la nomo „Milito“. Ĝi prezentas sendube grandan verkon en senco de korpigo de difinita ideo en la pure arta formo.

Sur kadavroj, amasigitaj en densan maldelikatan mason en diversaj situacioj, malrapide paŝas nigra grandega monstro—ĉu sovaĝa ĉevalo, ĉu bovo, etendinte malsupren la kapon kun larĝigintaj naztruoj, kvazaŭ ĝi entiras en sin la odoron de sango kaj homaviando. Sur la monstro sidas homo, armigita per akra pikilo. La esprimo de tiu figuro estas senpasia, senvola, sklave humila. La rajdanto, evidente, atendas, kien ankoraŭ portos lin tiu ĉi monstro de l' milito, kiun ankoraŭ mortigi, kie ankoraŭ verŝi la varmegan sangon por satigi tiun ĉi nesatigeblan, sangavidan sovaĝbeston. Sendube, Stuk konsideras la militon tute alie ol Vereŝĉagin. Li vidas en ĝi la aperon de elementa forto de l' mondo, kontraŭ kiu ni estas nekapablaj batali. Ni, homoj—estas nur malfortaj sensignifas partetoj de tiu ĉi mondo kaj ne havas kapablecon kontraŭbatali ĝian pereigan potencon kaj la terurajn esprimojn de ĝia malbono. Kun senplenda humileco kun malakra doloro en brusto, kun klara konscio de l' plena teruro de tiu ĉi senhalta abomeninda krimo,—iras ni mortigi niajn simlulojn, ne povante elŝiri sin el la kroĉemaj ungegoj de ĉi tiu nigra forto.

Mi donas la enhavon de tiu ĉi pentraĵo por substreki, kun kia mirinda pleneco ĝi estas prezentita de la pentristo. La nigra monstro faras forpuŝegantan impreson kaj samtempe nevole humiligas nin per ia peza, premanta hipnozo, la spirito de la ideo plene

montras sin en la bildo kun forkaptanta humoro. Tio ĉi, ĝuste, estas la ĉefa valoro en artaj verkoj.

La ĉefa difekto en la pentraĵoj de Vereŝĉagin—estas ĝuste la manko de tia pleneco, de tia lumiga larĝeco; kaj ĉe la dismeteco de lokigo de personoj, liaj verkoj ofte rememorigas kunvenon, kie ĉiuj parolas samtempe: ia kunmetado de substrekitaj kaj helaj apartecoj, montranta la senfortecon de la arta intenco diri tion saman kaj esprimi la saman ideon per unu movo de la pentrilo, kapti en tuteco la komunigan penson kaj esprimi ĝin en bilda figureco. Iuj personoj trovis kaj trovas meriton en tio, ke Vereŝĉagin forjetis la malnovan kondiĉecon en la grupado, t. e. li rompis la regulojn, laŭ kiuj oni devis ĉiam meti la ĉefan figuron en centron de la bildo, kaj ĉirkaŭe la malpli gravajn personojn, porke oni ricevu belan grupon.

Efektive en tiu ĉi rilato li kun la propra al li kuraĝeco faris paŝon antaŭen al detruo de la reginta ordinareco sed samtempe li ofte faladis en alian ekstremon. Lia grupado iutempe faras impreson de okaza fotografaĵo, kie ĉiu angulo de l' bildo vivas aparte, kvazaŭ okaze trovita en vivo san interligo kaj parenceco kun la aliaj, ne konsentante kun la komuna ideo.

